

John Ellerton,
Finiĝas nun
alia tago

*tradukita de William
John Downes*

1. Finiĝas nun alia
tago,
jam venis la vespera
hor'.
Kunvenis ni por ad-
orago
plaĉanta al la Di-
Sinjor'

2. Ni dankas Vin, Sa-
vanto nia,
ke sur la tuta mond-
teren'
la sankta eklezio Via
staradas firme ĉe po-
sten'.

3. Ruliĝas tero, brilas
lumo
de ne-ĉesanta maten-
glor'.
Leviĝas laŭdo, preĝ-
parfumo
konstante, kiel dolĉ-
odor'.

4. Ekdormas ni post
sun-subiro;
gefratoj en la okci-
dent'
vekiĝas kun novtag-
aspiro
Vin glori per viv-
elokvent'.

...

John Ellerton,
Ni estis ja en
mano Dia

*tradukita de Manfredo
Ratislavo*

1. Ni estis ja en mano
Dia,
dum brilis super ni la
Sun'.
Protektu nin per ma-
no Via
dumnokte, Dio, ankaŭ
nun!

2. La ter' cirkulas ĝis
la veno
de l' nova tag', ripozas
ni
dum tiu nokt' en Via
beno²
ĝis la mateno, kara
Di'.

3. Nun kiam en mal-
hel' fordronas
la Sun' en tiu ĉi ves-
per',
multvoĉe Via laŭdo
sonas
alialoke sur la Ter'.

4. Ĉar kiel estas
ĉirkaŭanta
la Teron lumo de l'
maten',
senĉese estas pluso-
nanta
preĝado de la homoj
jen.

...

John Ellerton,
Du lässt den Tag,
o Gott, nun en-
den

*tradukita de Raymund
Weber*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio
estas barita.
Supozeble la aŭtoro deci-
dis tion.

John Ellerton,
Forpasis tiu
tag', Sinjoro

*tradukita de Frieder
Weigold*

1. Forpasis tiu tag',
Sinjoro,
Kaj profundiĝas la
senlum'.
Vi gardis nin de ajn
doloro.
Nin gardu ankaŭ
dum noktum'!

2. Ni rotacias en la
tagon.
En nokta paco dor-
mas ni.
Kaj portas lumon
trans la maro
La suno, kie brilas ĝi.

3. Senĉese kiel la ma-
teno
Briladas super tera
rond',
Eksonas laŭdo pro la
beno
Al ĉiu sur la vasta
mond'.

4. La suno, kiu ĵus
subiris,
Ja brilas en plu fora
land'!
La gloron, kiun ni
admiris,
Anoncas plu preĝada
kant'.

...

²aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

5. Formortos mondaj
 imperioj,
 sed Via regno kres-
 kos plu.
 Al Vi sin cedos dina-
 stioj,
 Venkinto estos vi, Je-
 su'!

...

5. Ja estas, Dio
 ĉiopova,
 senlima Via regno, nin
 konduku al la tago no-
 va
 en Via regno je la fin'!

...

...

5. Pereas regnoj. Tiel
 estu!
 Kaj sole staras via
 tron',
 Ke sole via regno re-
 stu
 Je fina tag' sub unu
 kron'.

...

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (*1892 - †1987).

Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)

Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diserva Libro "Adoru", eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-01-10.

Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en la Germanan de Raymund Weber.

Arg-130-256 (2008-11-08 15:30:25)

Diese Übertragung ins Deutsche ist abgedruckt in dem Gesangbuch der Katholischen Kirche in Deutschland "Gotteslob", in der neueren Ausgabe. Der Text mit den Musiknoten findet sich auch auf der Heimseite http://www.documentacatholicaomnia.eu/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.

Traduko de la Angla poemo "The day Thou gavest, Lord, is ended" de JOHN ELLERTON (*1826-12-16 - †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.

Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)

Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro "Gotteslob" (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo http://www.documentacatholicaomnia.eu/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf.